# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ EL POLA RADIO

### 3.2. EKSPOZICIO PRI BJALISTOKAJ JUDOJ

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

**Taskoj:**

*1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj :*
a) en formato MP3:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr01.mp3
aŭ
b) en formato RealAudio :
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr01.rm.

*2) Respondu al la subaj demandoj.*

1. Trovu la urbon Bjalistoko (pole *Białystok*) sur mapo.
2. Kio ligas ĉi tiun urbon kun Esperanto?
3. Serĉu materialon pri la juda loĝantaro de Bjalistoko antaŭ la dua mondmilito.

*3) Je la dua aŭskultado, se necesas, vi povas ankaŭ legi la tekston.*

**Ekspozicio pri bjalistokaj judoj**

Personaj memoraĵoj ligitaj kun judoj loĝantaj antaŭ la 2-a mondmilito en Bjalistoko – notaĵoj, dokumentoj, fotoj – estas prezentataj kadre de la ekspozicio „La bjalistokaj judoj – historio kaj memoro”, kiu estis malfermita en la bjalistoka Historia Muzeo.
La Historia Instituto de la bjalistoka universitato de kelkaj jaroj eldonas dokumentan libroserion „Bjalistokaj judoj”. Ĝis nun aperis kvar tiaj volumoj. La plej fama bjalistoka judo estas la kreinto de Esperanto, d-ro Zamenhof, agnoskita kiel „bjalistokano de la 20-a jarcento”. (2003-07-19)

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi nun **ne bezonas** la solvojn!